

N° 180
octobre
novembre
décembre
2017

LA INFORMILO

N° 180
oktobro
novembro
decembro
2017

l'espéranto
la langue de l'amitié
sans frontières

esperanto
France-Est

ESPERANTO
2017
Justa komunikado

Esperanto
la lingvo de l'amikeco
sen landlimoj



ESPERANTO FRANCE-EST

association culturelle
pour la promotion
de la langue
internationale

ESPERANTO

regroupant
les départements

Bas-Rhin (67)

Haut-Rhin (68)

Meurthe-et-Moselle (54)

Meuse (55)

Moselle (57)

Vosges (88)

Maison des Jeunes
et de la Culture

"Philippe Desforges"

27, rue de la République

FR-54000 NANCY

ABONNEMENT / ABONO

Papera versio: 17€

Reta abono: 7,50€

Ils furent nombreux, les citoyens d'Europe de l'est, à quitter les pays gouvernés par des régimes communistes plus ou moins durs. Parmi eux de nombreux espérantophones qui vinrent s'affilier à nos clubs d'espéranto et qui contribuèrent à leur dynamisme.

Les occidentaux qui firent le chemin inverse furent bien moins nombreux. Parmi ceux-ci on trouve aussi des espérantophones!

L'un d'entre eux mérite de ne pas être oublié: Roger IMBERT, né à Migennes (Yonne).

Grâce aux informations de la romancière espérantophone Spomenka Štimec et de Slatko TIŠLJAR, dynamique secrétaire général de l'association internationale EEU (Eŭropa Esperanto-Unio/Union Européenne d'Es-

péranto) notre association régionale a pu éditer une petite brochure pour rendre hommage à notre concitoyen qui avait rencontré à Paris sa future épouse Nevenka, étudiante yougoslave, espéranto-phonie et francophile, et a fondé une famille en Yougoslavie.

Roger IMBERT a contribué pour une large part au travail remarquable réalisé en faveur de la Langue Internationale au sein du dynamique groupe de Zagreb. Il mérite bien d'être connu des espérantophones de son pays natal.

Li ne iĝis profeto en sia lando
(Francio)...
sed eminenta esperantisto
en Zagrebo (Kroatio)

Memorige al
Roger IMBERT (1938 - 2009)



**Al ĉiuj niaj legantoj ni deziras plej feliĉan
novan jaron 2018 kaj sukcesojn en viaj
Esperanto-agadoj.**

La 25-a INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO DE LA KULTURO KAJ TURISMO EN TOSSA DE MAR 30. 9.-7. 10 2017

La Esperanto-semajno de Katalunio okazis ĉi-jare norde de Barcelono en Tossa de Mar. Nova teamo transprenis la tutan organizadon kun kiel ĉef-organizantino Rosa López. Eblis konstati la kompetenteccon de la diversaj kunorganizantoj, interpretistoj kaj ceteraj kunhelpantoj. Tial ĉi-tiu semajno estis vere alloga kun novaj programeroj.

Jen raportas pri ĝi Liba Gabalda.

La jubilea Esperanto-Semajno estis ĉi-jare organizita fare de la nova teamo de katalunaj esperantistoj. La torĉon transprenis la ĉef-organizantino Rosa López. Luis Serrano Pérez, kiu senlace laboris por Esperanto ĝis la lasta momento de sia vivo, forpasis la 24-an de aŭgusto en sia 91^a jaro. Ni omaĝis lin dum la renkontiĝo.

La eventon partoprenis 108 geesperantistoj el 12 landoj (Belgio, Danio, Francio, Germanio, Hispanio, Hungario, Irlando, Italio, Latvio, Litovio, Svedio, Svislando). La evento okazis en kvarstela hotelo *Don Juan*. Je dispono estis granda naĝbaseno sur tegmenta teraso, kie kelkaj el ni agrable baniĝis.

Ne agrabla estis renkonto kun meduzoj de du partoprenantinoj, kiuj volis ĝui la maron.

Dimanĉe okazis la malfermo de la Semajno. Bonvenigis nin la skabeno de la urbodomo s-ro Sergio Bruno. Pro la balotado por la sendependiĝo de Katalunio la urbestro Gisela Saladich Parés ne povis ĉeesti la solenaĵon.

La programo estis riĉa kaj tamen restis multe da tempo por ripozi. Okazis du interkonaj vesperoj kun ŝaŭm-vino kaj "moskatel"-vino kaj kelkaj almanĝaĵoj. Krome ne mankis tradicia *cremat*-vespero.



Ateliero pri Esperanto temis pri praktikado de la lingvo, sperte gvidata de Luz Vázquez, kiu ankaŭ prezentis



sanigadon tekniko de Bruno Gröning per spiritaj fortoj. Ana Manero sciigis nin pri la madrida biblioteko Juan Regulo Pérez. Gian Carlo Fighiera prezentis du dramojn de *Shakespeare: Macbeth* kaj *Hamlet*. Ĉiuj bone amuziĝis ĉe la ludo: Kiu volas fariĝi milionulo? inspirita laŭ televida programo "Ĉu vi volas fariĝi milionulo?" En niaj modestaj kondiĉoj ni kontentiĝis nur pri milionulo. Ĝi estis preparita kaj tre lerte prezentata de José Antonio del Barrio (Tonjo). Li ankaŭ informis pri la nuna stato de Esperanto en Hispanio. Thierry Saladin parolis pri la Internacia peticio kaj projekto TUJ! Li ne forgesis vendadi porokazajn T-ĉemizojn.



Aperis nova programero “Peĉakuĉo”, en kiu ĉiu partoprenanto devas rakonti en limigita tempo pri difinita temo helpe de bildoj. Komencis Tonjo pri la temo: “Kiel filoj de esperantistoj estas geniuloj”, Hubert De Meyere klarigis kiel “Uzi sian kapon”, Angel Garcia parolis pri “Kosmaj distancoj kaj vojaĝoj”, Martine Demouy promenis nin tra la urbo “Périgueux”, Michel Chadelaud informis pri migrado kun sia edzino Annette dum “16 tagoj sur la pado de Kompostelo”. André Grossmann prezentis diversajn trukfotojn. Ĝi estis tre interesa programo.

Okazis aŭkcio por akiri iom da mono por la asocio. Kun granda sukceso prezentis ĝin Tonjo. Vendiĝis pluraj donacitaj libroj kaj aliaj esperantaĵoj kun aldonaj objektoj.

Dum la ĵaŭda vespero la folkloro grupo *Esbart San Pol de Mar* regalis nin per belega spektaklo de tipe katalunaj dancoj. Ĉe la fino estis prezentata danco *sardana* kaj la dezirantoj povis kundanci.

La kutiman programeron de opero anstataŭis deklamado de poezio, kiun iniciatis Angel Argilos ŝatanto kaj verkisto de poemoj. Partoprenis pluraj samideanoj. Pri latviaj birdoj kaj kuraĝaj junuloj ni eksciis de Aldis Buŝs. La vendreda vespero finiĝis per kolektiva kantado sub gvido de Jeanne Draime kaj Martine Demouy.



La premio Ada Sikorska estis aljuĝita al Ana Manero pro ŝia meritplena laboro por Esperanto en Hispanio. La nove ellaborita trofeo kun portreto de Ada tre plaĉis al ĉiuj. Ankaŭ Gian Carlo Fighiera ricevis ĝin por rememoro pri sia kara edzino.

Dum la unua duontaga ekskurso okazis gvidata vizito en la

urbeto *Tossa de Mar*. La ĉiĉerono konigis al ni ĝian historion kaj montris interesajn lokojn. Impona estas la kastelo, kiu etendiĝas sur la monteto, de kie ni observis la mar-bordon kaj la vastan ĉirkaŭaĵon. Montrante la E-ŝildon ni povis senpage viziti la urban muzeon.

Dum la tuttaga ekskurso ni malkovris la belan urbeton *Besalú*. Pro sia ĉarmo ĝi estas invadita de turis-



toj. Ankaŭ ĉi tie ni ĝuis promenadon kun loka ĉiĉeronino kun brila tradukado de José María Salguero (Kani). Estis sufiĉe da tempo por trankvile ripozi, kafumi aŭ bierumi. A n k a ŭ

glaciaĵoj bongustis.

En la dua duontaga ekskurso ni promenis kaj admiris la belegan kaj ekzotikan botanikan ĝardenon *Marimurtra* en *Blanes*. Diversaj mediteraneaj kaj ekzotikaj plantoj kaptis nian atenton. Ankaŭ diversaj kakttoj, bambuoj kaj palmoj troviĝas tie. Ni eĉ gustumis kelkajn maturiĝantajn fruktojn ĵus falintajn de la arbo. Luj fotiĝis kun papagoj.

Konklude la Esperanto-Semajno bone disvolviĝis. Dankon al la nova teamo pro tre agrablaj tagoj pasigitaj en *Tossa de Mar*.





Lerteco por trinki el tia botelo kaj lerteco pro grimpa al arbo



EKSKURSOJ BESALU

Besalu estas vilaĝo de la regiono La Garrotxa en la provinco de Girono. Ĝi altas je 150 metroj super la mar-nivelo, ĝia areo estas 4,81 kvadrataj kilometroj kun proksimume 2.450 loĝantoj.

Besalu signifas fortikaĵo inter du riveroj: Fluvia sude kaj Capellades norde. La urbo estas turisma centro pro ĝia mezepoka arkitekturo.

Besalu havas gravajn konstruaĵojn: La Ponto, La Judaj Banejoj, La Preĝejo de Sankta Petro de Besalu, La Preĝejo de Sankta Juliano, estis antikva pilgrima-hospitalo, La Domo Cornella kaj la Gotika Salono de la Reĝa Kurio.

Marimutra Botanika Ĝardeno de Blanes

Marimutra Botanika Ĝardeno de Blanes estas unu el la plej bela de la Mediteranea maro.

Ĝi havas 16 hektarojn, sed 5 dediĉita al la vizitantoj, kaj estas situata sur monto kaj havas mirindajn mar-pejzaĝojn. La ĝardeno posedas 4000 vegetaĵajn speciojn, plej multaj ekzotikaj, kaj multaj tre aĝaj.

Marimutra estas la laboraĵo de Carl Taust (Hadamar, Germanio 1874 - Blanes 1952), entreprenisto loĝinta en Katalunio. Li estis entuziasmulo pri la naturo kaj dediĉis sian klopodon, fortunon kaj iluzion al la Marimutra Botanika Ĝardeno.



Dum la jaŭda vespero la folkloro grupo *Esbart San Pol de Mar* regalis nin per belega spektaklo de tipe katalunaj dancoj. Ĉe la fino estis prezentata danco *sardana* kaj la dezirantoj povis kundanci.

Esbart Dansaire de Sant Pol

La grupo pri danco Esbart Dansaire de Sant Pol, kreĝis en la jaro 1942, do en 2017 ili celebras sian 75-an datrevenon.



Ĉi grupo organizas ĉiujare la Festivalon pri Danco en Sant Pol de Mar en la monato Julio, kaj tio jam okazas de 20 jaroj. Ĝi havas longan sperton pri festivaloj, naciaj kaj internaciaj kaj estas la ununura




grupo pri dancado, kiu ludis ĉe mediteranea en la ŝipa spektaklejo.

La grupo ricevis multajn premiojn, kaj la aljuĝita de la Departamento pri Kulturo de la Generalitat de Katalunio kaj la venonta okazos la 24-an de novembro de 2017 en la urbo Figueres, kiu hazarde, ĉi jare estas la ĉefurbo de la "sardana".

nea krosado kun ĉeesto de 1.500 homoj

lasta okazis la 1-an de junio 2017,



Poŝamiko Jen agrabla libreto, kiu trafe prezentas sur 40 paĝoj, gramatikajn resumojn, tekstetojn, kelkajn ekzercojn kaj laŭtemajn bild-vortarojn riĉe kolor-ilustritajn. La poŝforma eldonaĵo (A6) bone povas servi kiel poŝlibreto al kursanoj je komencanta kaj komencinta niveloj, aŭ kiel varbocelaj donacoj kaj propagandiloj.
Afrankite: 6,50 eŭroj

Jen kortuŝa rakonto pri la travivaĵoj de Carlo Nicolodi, en malfacila periodo, kiam en Eŭropo furiozis la dua mondmilito. Lia patro Arturo, itala esperantisto, kaj Vera, latva esperantistino, ja konatiĝis koresponde pere de Esperanto kaj geedziĝis en Italio, sed la Dua Mondmilito ilin disigis kaj ilia bebo Carlo iĝis Kārlis en Latvio, dum la patro estis malliberulo en nazia lagero. Nur plurajn jarojn post la milito Kārlis iĝis denove Carlo en Italio. Sekvis plenkreskula vivo en Germanio kaj Svislando. La edzino de Carlo, Anne-

Lise Nicolodi-Nielsen, danino kaj esperantistino, iniciatis la eldonadon de tiu libro en la germana kaj dana lingvoj. Ni nun povas proponi al vi la Esperanto-version de tiu libro eldonita de nia asocio Esperanto-France-Est.

Afrankite por Francio 92-paĝa libro 15 € por Eŭropo 13 €

Poŝamiko

Taso da kafo

Kio? taso da kafo = kafetaso
sako da/por aĉetaĵoj = aĉetsako

Kiom?

taso da kafo plado da fromaĵoj sako da aĉetaĵoj

skatolo da ĉokolado skatoleto da alumetoj peco da torto bokalo da konfitajo sako da tritiko

glaso da vino botelo da vino kesto da boteloj kesto da pomoj korbo da fruktoj

kruĉo da biero suĉbotelo da lakto staplo da libroj bretaro da libroj vazo da floroj

Aĉetu unu . . . on da . . . aj kaj tri . . . ajn da . . .

- 20 -

**Roberto raportas
pri la**

**Gaja
semajnfino**

2017

6a-8a oktobro



en Schwäbisch Gmünd

la unua ŝtaŭfa* urbo

Ĉar mi recenzas, mi do partoprenis!


Mi atingis la lokon per mia veturilo akompanate de Ginette Martin kaj Simone Kiry, kun peno sur la germanaj aŭtoŝoseoj kaŭze de la trafik-ŝtopiĝoj. Startinte vendrede tagmeze, ni alvenis post la 19a ... sed la parkejo estis okupita pro samtempa koncerto en apuda salono! La organizantoj ne povas ĉion antaŭvidi!

“Schönblick” estas moderna kaj bela sed vastega kulturdomo! Oni bezonas marŝadi longe inter dormo-ĉambro, manĝejo kaj Esperanto-salono!



La semajn-fina aranĝo estis efektive malsama ol la tradiciaj kursoj kaj prelegoj.

Ni komencu vendrede vespere per “origamio”, papera faldado ekzemple de kolora banderolo al kreado de stelo ... “en knajpa etoso”.





Sabate matene vizito al la famkonata firmao Weleda, kreanto de naturaj produktaĵoj de biologiaj plantoj. Gmünd estas unu el la tri plantaĵoj kies surfaco konsistas el 23 hektaroj. Promenado tra parto de 5 hektaroj sub feliĉe sen-pluva vetero. Posttagmeze irado piede tra arbaĵoj dum du km-oj kun sciencaj klarigoj de forstisto, ĝis la centro de la urbo (“Schönblick” situas ĉe la rando de la urbo), kie ni frandis bongustan manĝon vespere en restoracio.



Reveninte al la Esperanto-salono ni spektis ludan fotografiaĵon..

Dimanĉe matene okazis diversaj prezentataĵoj fare de iuj inter la 30 partoprenantoj, pri astrologio, la afero de la faligo de la turoj en Usono en 2001, de agadoj en Afriko. Eĉ ne povis paroli ĉiuj, kiuj preparis ian temon, ĉar ni forveturis al la ĉirkaŭaĵo de Gmünd por manĝi en restoracio-monaĥejo, kies vizito estis planita.



Sed post la manĝo, je la tria, la solaj “tri francoj” (krom la “libro-servisto” Jean-Luc) hejmen veturis ĉar longis la vojo (300 km-oj) sen tro da pluvo!



Raportis Roberto



La dua plej mult-flanka sporta evento post la Olimpikoj estas verŝajne "La Mondaj Ludoj" (LML/TWG *The World Games*) kiu estas organizata ankaŭ unufoje ĉiun kvaran jaron. Oni nomas ĝin ankaŭ Ĉampionado de Neolimpikaj Sportoj kaj celo de tiu malferma konkurso estas promocii tiajn sport-disciplinojn, kiuj ne aperas en la Olimpikaj Ludoj.



Mondaj Ludoj – parto 1

Ĉio komenciĝis en jaro 1980 kiam s-ro Un-yong Kim, tiama prezidento de Monda Tekvondo-Federacio invitis ĉefojn de kelkaj sport-asocioj kaj proponis organizi novajn ludojn por neolimpikaj sportoj. Tiel estiĝis Internacia Asocio de Mondaj Ludoj (IAML / IWGA - *International World Games Association*) kiu sekvajare organizis la 1-ajn Mondajn Ludojn en usona urbo Santa Clara kun partopreno de 1745 sportistoj kiuj reprezentis 58 landojn kaj konkurencis en 15 disciplinoj. La jubilea 10-a evento okazis ĉijare inter la 20a kaj 30a de julio en pola urbo Wrocław kie la antaŭaj nombroj preskaŭ duobliĝis: alvenis pli ol 3100 sportistoj el 102 landoj kaj la publiko spektis 27 sportajn konkursojn. Intertempe (ĉiam unu jaron post la Olimpikoj), la eventon gastigis Britujo, Finnlando, Germanio, Japanio, Kolombio, Nederlando kaj Tajvano.



Petanko (fr: *pétanque*) estas unu el globludoj, kiu devenas de suda Francio sed oni ludas ĝin ankaŭ en Nordafriko kaj Sudorienta Azio.



Dum la Mondaj Ludoj la sportistoj rad-sketas en diversaj disciplinoj. Sur la dekstra foto, la geduo demonstras akrobatikan gimnastikon. La organizaĵo IAML / IWGA kunlaboras kun la Internacia Olimpika Komitato, kiu apogas la Mondajn Ludojn kvankam plimulto de ĝiaj sportoj ne havas ŝancojn eniri la programon de Olimpikaj Ludoj. Kelkaj elinter LML-disciplinoj aplikeblas en praktika vivo.



Ekzemple **roka grimpado** postulas firmegan man-ekpremon, kio faciligas konkeradon de altaj montoj. Tie la aventuremaj turistoj troviĝas meze de la sovaĝa naturo, foje dum neatenditaj veter-ŝanĝoj kio povas kaŭzi dramon.



Karaj gesamideanoj,



En ĉi tiu numero de LA INFORMILO vi trovos alian ANGULON! Ĝin havigis al ni nia fidela membro Armand HUBERT el Sarreguemines. Ĝi titolas AVULA ANGULO, sed dank'al la enhavo, vi malkovros, ke nia samideano daŭre junece batalas por la lingvaj rajtoj. Li ja mem spertis epokon, kiam tiujn rajtojn oni ankaŭ nialande tretis senkomplete. Kaj li kuraĝis kontraŭagi kaj nun daŭre plubatalas!

Nia batalo por la disvatigo de Esperanto ne tiom danĝeras, kio ne signifas, ke ĝi ne facilas, des pli ke nia malamiko eĉ pli universalas: la indiferenteco! Vasta batalfronto! Ĉu ni rajtas rezigni???????

Ĉio tio ne malhelpas, ke mi deziru al vi ĉiuj ĉion bonan por 2018!

E.L.

Multis la orienteŭropanoj, kiuj forlasis sian landon dum estris tie komunistaj registaroj. Ankaŭ esperantistoj forlasis tiujn ĉi landojn, nun aktivis en okcidenteŭropaj landoj kaj ne malofte vigligis niajn klubojn.

Sed malplimultis la okcidenteŭropaj civitanoj, kiuj migris orienten kaj ekvivis tie. Ne estis esceptoj la esperantistoj, kaj same kelkaj inter ili kontribuis al la vivo de tieaj grupoj.

Unu inter ili estis la franco Roger IMBERT el Migennes (Departemento Yonne). Dank'al la informoj de Spomenka ŜTMEC kaj Slatko TIŠLJAR (Pajo) vi malkovros homon, kiu meritas esti konata, ankaŭ en sia origina lando.

Edmond LUDWIG

Nia asocio **Esperanto France-Est** planas eldoni tiun libreton en januaro 2018. Ĝi ampleksas 28 paĝojn kaj estas jam nun mendebla ĉe nia kasisto.

La libreto 4 eŭroj + sendkostoj 1,50 eŭroj

Li ne iĝis profeto en sia lando
(Francio) . . .
sed eminenta esperantisto
en Zagrebo (Kroatio)

Memorige al
Roger IMBERT (1938 – 2009)



LA ŜTONO
DE LA AMO

ELEKTITAJ POEZIAĴOJ



SALI BASHOTA

La ŝtono de la amo Elektitaj poeziaĵoj

Vi certe memoras pri Bardhyl SELIMI, kiu prelegis dum printempa staĝo en Le Vic (Vogezoj), en la universitato de Mulhouse kaj en asocia domo en Strasburgo en 2011. Vi regule povas legi liajn artikolojn pri Albanio kaj Kosovo en MONATO.

Jen lia lasta tradukaĵo!

Poezio kaj poezia prozo de unu el la plej elstaraj vivantaj poetoj de Kosovo, kiu en siaj verkoj respeguligas malĝojon, doloron kaj senesperon de albanoj en Kosovo, sed ankaŭ amon, revon kaj esperon je nacia revekiĝo.

Sali Bashota, profesoro de filologio, poeto kaj prozisto, mem spertis perforton praktikitan al la albana popolo en la tragika tempo de la lasta milito en Kosovo dum la jaroj 1997-1999, kiam en aŭgusto 1998 ankaŭ lia domo estis krimbruligita. Dume forbrulis ankaŭ ĉiuj liaj manuskriptoj.


En sia verko plena de metaforoj kaj de arta prilaboro de la plej nova historio li ofte revenas ankaŭ al eventoj de pratempa historio kaj al mitologio.

Aŭtoro: Sali Bashota

Traduko el la albana: Bardhyl Selimi

ISBN 978-80-87169-85-8 395 paĝoj.

19.50EUR

Espéranto France-Est		Orient-Franca Esperanto-Asocio.
La Informilo	Bulletin bilingue d'information sur la langue internationale ESPERANTO	Dulingva inform-bulteno pri la internacia lingvo ESPERANTO
Rédaction: Redaktoro:	Edmond Ludwig kaj André Grossmann	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM
Les articles à insérer doivent parvenir impérativement à la rédaction dans les délais suivants:	Article manuscrit à éviter Texte envoyé par courriel doc, odt Document avec mise en page (PDF) marges identiques à cette page-ci	un mois 3 semaines 2 semaines avant la fin de chaque trimestre
Les articles signés nommément par leurs auteurs expriment la seule opinion de ces derniers.		

Komitato de la Asocio		Comité de l'Association	
Funkcio	Adreso	Telefono	Ret-adreso
Prezidanto + PKK <i>Président + Cours par correspondance</i>	S-ro Edmond LUDWIG 26, route de la Schlucht 68140 STOSSWIHR	03.89.77.52.56	esperanto.eludwig@orange.fr
Sekretario <i>Secrétaire</i>	S-ro Robert KUENY 30, rue des Champs 68690 GEISHOUSE	03.89.82.37.62	kueny.robert@neuf.fr
Kasisto - Redaktoro <i>Trésorier - Rédacteur</i>	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	03.69.54.46.93	andreo.ag15@sfr.fr
Libroservo <i>Service Librairie</i>	S-ro Jean-Luc THIBIAS 37, rue Pierre et Marie Curie 54500 VANDOEUVRE	03.83.53.57.54	jean-luc.thibias@laposte.net libroservo.efe@laposte.net
Aliaj komitatanoj	S-ino Liliane BERSWEILER	03.83.47.41.36	liliber54@yahoo.fr
Assesseeurs	S-ino Micheline COLNOT	03.83.27.46.93	michelinecolnot@orange.fr
	S-ro Jacques HERLÉ	03.87.01.00.39	jacques.herle@laposte.net
	S-ro Jacques PINEDA	03.89.42.88.54	pineda.ventron@gmail.com
	S-ino Simone KIRY	03.89.57.68.10	
	S-ino Ginette MARTIN	03.29.24.68.46	gimavo@wanadoo.fr
	S-ino Madette AST	03 87 01 32 85 06 70 94 11 84	madette20@hotmail.fr
	S-ino Gisèle BERTAPELLE	03.83.56.17.37 06.80.68.94.78	bertapelle.gisele@wanadoo.fr
	S-ino Catherine HEL	03.83.47.63.07	cathello@laposte.net
	S-ro Yves STUTZ	03.89.39.83.14	stutzyves@gmail.com
S-ro Gilbert STAMMBACH	03.88.96.67.59	gilbert.stammach@gmail.com	


Abono al La Informilo →	17 eŭroj	reta abono: 7,50 eŭroj	← Abonnement à La Informilo
Pagoj per ĉeko je la nomo de →	Esperanto France-Est		← Paiement par chèque au nom de
Pagoj per ĝiro al jena konto →	CCP 1997 72 W NANCY		← Paiement par virement au compte
Per internacia ĝiro →	IBAN : FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC : PSSTFRPPNCY		
Bank- aŭ poŝt-ĉekoj sendataj al la Kasisto Adres-ŝanĝo: Informu al →	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	Chèque bancaire ou postal ou changement ← d'adresse à envoyer au trésorier	

- | | |
|-----------------------------|------------------------------------|
| 1. Roger Imbert | 15. Staĝo en Rimlishof |
| 2. Semajno en Tossa de Mar | 16. Traduko |
| 3. Semajno en Tossa de Mar | 17. Nia Libro-servo |
| 4. Semajno en Tossa de Mar | 18. Enigmoj kaj poemoj |
| 5. Semajno en Tossa de Mar | 19. Abonoj kaj kotizoj |
| 6. Gaja semajnfino en Gmünd | 20. Kotizo-tableo: Nos cotisations |
| 7. Gaja semajnfino en Gmünd | 21. Centra oficejo en Roterdamo |
| 8. La Torĉo | 22. Centra oficejo en Roterdamo |
| 9. Angulo de la prezidanto | 23. Teo kaj Amo en Pollando |
| 10. Komitatanoj kaj Menuo | 24. Teo kaj Amo en Pollando |
| 11. Avula Angulo | 25. Teo kaj Amo en Pollando |
| 12. Ora Ponto en Ĉinio | 26. Teo kaj Amo en Pollando |
| 13. Ora Ponto en Ĉinio | 27. Teo kaj Amo en Pollando |
| 14. Staĝo en Rimlishof | 28. Fotoj Barato stacio Gorakhpur |

ISSN 0291 6037 trimestriel
N° CPPAP : 0409 G 83517
bulletin d'information bilingue sur l'espéranto
édité par l'association culturelle
Espéranto France-Est
MJC PhiJippe Desforges - 27 rue de la République
54000 NANCY
Directeur de la publication : **Edmond LUDWIG**
Rédacteur provisoire : André Grossmann
Dépôt légal : **30 septembre 2013**
Imprimé par l'imprimerie Sprenger

AVULA ANGULO

Armand HUBERT

... *alflugas rememoraĵoj!*

MANIFESTO 2000, por kulturo de malperforto.

Antaŭ dudekkvin jaroj, brakumante la lingvon de Zamenhof, multaj el ni konsciis, ke ili suriris ankaŭ batal-kampon de rajtoj sur internacia nivelo.

Jen en decembro 1999, ni ricevis firmigilon de tia servo-iro per lanĉo de Uneska kampanjo. Naskiĝis "Internacia Deklaro de Malperforto" per teksto, kiun redaktis Nobelpremiitoj pri Paco: *la Manifesto 2000*.

Kaj tiam finjare, ekspozicio pri la "Manifesto 2000" estis survoje, helpe de GEE (Groupe des Enseignants Espérantophones) kaj de EFE (Espéranto France-Est), en Sarreguemines.

Naŭ tabuloj je dimensioj 50 x 70 kreiĝis. Ili utilis en kunveno de nia federacio kune kun prezentado

kaj lumbildoj. Ili rondiris en mezgrad-lernejoj en *arrondissement de Sarreguemines* kaj alie. Afiŝformaj kopioj dissemiĝis en landaj esperanto-grupoj.

Strange. La kampanjo por "kulturo de la paco" fiaskis internaci-nivele. Pro politikula ne bontaksado? Eble ankaŭ pro tiama etoso: la refreno de la jaroj post-68, "*Tout le monde, il est beau, tout le monde, il est gentil!*" (Ĉiu ja belas, ĉiu ja afablas!) daŭre svarmanta.


Se en esperantista medio tamen, oni sentis sin alparolitaj, nia eduk-sistemo ne sciis kapti tiun apelacion de Nobelpremiitoj.

Nu, en niaj rondoj, ĉu ni hodiaŭ sufiĉe konscias pri nia ligiteco kun homrajtoj kaj ties defendo?

"DIOJ" MODERNAJ

La nunaj dioj ne tron-sidas sur monta Olimpo, sed en paradizoj, kie oni ŝparas impoŝtojn. La nunaj dioj estas riĉeguloj, -meze de ni, -sur sama benko! Ili bezonas vastan sidlokon, apogas sin sur sia sekreta monŝranko, ŝatas kalkuli en dolaroj, nepre mistaksas nian lingvon.

Flanke de tia sibarito, esperantlingva ineto firme tenas sian lingvan trezoron kaj revas pri solidareca socio. Kun sia aparta lingvo, ŝi flegas homrajt-favoran sindonemon kaj ne ŝtapolas kontojn en sen-impoŝtejo.

**KONTRAŬLEĜE**

Kiam mi estis 12-jara, loĝanta en lorena vilaĝo, koŝmaris milito.

En nian lernejon alvenis juna instruistino: ŝi estis Germanino, dors-rekta, postulema, justa. Ŝi certe ricevis instrukciojn por kreskigi naziulan sintenon en eks-franca regiono, aneksita. Ni, flanke de niaj gepatroj ricevis instrukciojn por montri de-teniĝemon kaj parol-prudenton.

Nu, ludkunulo kaj mi malkovris amason da libroj sub lerneja tegmento: estis la libroj de la instruista biblioteko, franclingvaj, kiuj eskapis tie al detruo. Ili interesis nin.

Unu tagon, ni gvatis foriron de "Fraülein Schneider", ŝi ja regule promenigadis sian hundon. Ni suprenrapidis al subtegmenta kaŝejo por ŝteli kelkajn librojn. (Ili estis tiel allogaj: Imagu! Sciencaj

verkoj kun kelkaj fotoj!).

Bedaŭrinde nia instruistino sin montris tre rapide. Ni du buboj estis en korprema kaptilo: kiel ŝtelistoj, kiel uzantoj de puneblaj legajoj. "*Sofort herunter!* Tuj malsupren! kriaĉis ŝi. Kion fifaras vi supre?"

- . . . kelkajn librojn, ni. . .

- Libroj? Kiaj libroj? Montru rapide!

Ŝi kuntiris la brovojn kaj grimacis vidante la francajn verkojn. Ŝi lante trafolumis unu el ili kaj aldonis: "Ĉu vi scipovas legi tion?"

Kiel dekdujaraĝulo, mi ja legis la francan senprobleme.

"*Schluss jetzt!* Fino nun!" Ŝi baldaŭ tondris kaj aldonis malpli alte. "Nu, suprenkuru! Elektu plian verkon! Kaj "for"! Ne plu revenu!

Je tiu tago, dum milit-tempo, Fraülein Schneider, Germanino, kontraŭleĝis sub nazi-reĝimo!

Mirinda renkontiĝo en Esperanto Centro Ora Ponto Ĉinio !

Mi estas emerita franca fervojisto, kiu vivas kun emerita ĉina fervojistino dum longa tempo en Changsha (Provinco Hunan). Nia komuna lingvo estas Esperanto. Mia edzino proponis al mi viziti la Esperanton-Centron "Ora Ponto", kiun estras Trezoro (S-ro HUANG Yinbao). Mi interkonsentis kun Trezoro por praktiki Esperanton kun tri novaj kaj junaj esperantistoj dum 10 tagoj en junio. Li diris al mi "vi ne bezonas prepari kurson de Esperanto, nur bonvolu paroligi ilin".

La 4-an de junio mi forveturis al Jingchuan (Provinco Gansu) en Norda Ĉinio. Mi trajnveturis dum 24 horoj (1500 km) de Changsha al Pingliang kaj survoje mi vidis tre belajn kamparajn kaj montarajn pejzaĝojn! Trezoro afable akceptis min en la

stacidomo de Pingliang kaj ŝoforis min al la Esperanto Centro "Ora Ponto" en Jingchuan.

Ĉi tie mi interkonatiĝis kun tri junaj esperantistoj (32 ĝis 40 jaroj) Hirunda kaj Songbo estas instruistoj de la angla en la meza lernejo. Jana kiu laboras por Esperanto en "Centro Ora Ponto" estas juna patrino de petolemaj kaj ĉarmaj infanoj. Ili estas progresantoj ĉar foje juna usonano instruis al ili Esperanton ĉi tie. Pro tio pli facilis por mi por komuniki kun ili ĉar mi ne parolas ĉine.

Mi ne preparis lern-materialon antaŭ ol forveturi. Mi uzis la surlokan materialon de la "Centro" kiel la tekstojn kaj la demandojn de la ĉina lerno-libro "Moderna Esperanto (2)". Ankaŭ mi elektis interesajn dialogojn el la revuo "Juna Amiko" de ILEI kaj artikolojn en la revuo "Monato".



La temoj estis tre diversaj: ĉiutaga vivo, kutimoj, rakontoj, kulturoj kaj teknikoj. Ĉefe mi celis paroligi la homojn.

Unue laŭvoĉe ni legis la tekstojn. Poste uzante "PIV" aŭ "Esperanto- Vortaron por Lernantoj" mi klarigis al ili la vortojn, kiujn ili ne konis. Ankaŭ ili uzis vortaron Esperanto-ĉina, aplikaĵon instalitan en iliaj poŝ-telefonoj. Kelkfoje mi klarigis per gestoj aŭ per bildoj la signifojn de la vortoj. Finfine mi faris demandojn pri la enhavo de la rakontoj kaj dialogoj. Sukcese ili respondis al multaj demandoj. Eĉ ili faris demandojn al mi! Ni parolis pri aliaj temoj, kiuj ne kuŝis en niaj materialoj. Tiumaniere ni interŝanĝis pri niaj diversaj kulturoj en Ĉinio kaj Francio. Tio estis tre interesa por mi kaj ili. Mi lernis multe dank'al ili!

Ili diris al mi ke ili devas lerni multe da novaj vortoj, kiuj estas tre malkproksimaj al la ĉina lingvo. Du lernantoj scipovas paroli la anglan. Tio certe helpas ilin. Jana pli penas ĉar ŝi neniam lernis fremdan lingvon. Tio estas tute normala. Tamen mi sentis, ke ili ĉiuj progresis multe en kelkaj tagoj.

Ili estis tre bonhumoraj, laboremaj kaj diligentaj. Ni laboris pli ol 6 horojn tage eĉ sabate kaj dimanĉe. Ili sentis, ke ili progresas praktikante Esperanton kaj havas motivon lerni kaj praktiki ĝin. Pro tio ili estis tre kontentaj. Ili regaligis min en restoracio de tempo al tempo kaj gastigis min hejme. Mi konatiĝis kun simpatiaj familianoj! Kelkfoje kiam sunis ni faris nian kurson en la naturo kaj vizitis kelkajn belajn lokojn.

Ankaŭ kun ili mi promenis en Jingchuan, kie oni tre rigardis min ĉar fremduloj tre malofte venas ĉi tien. La etoso estas tre bona, tie homoj sidas apud sia domo kaj diskutas kun najbaroj kaj eĉ kartludas kaj maĝangas (*Mah-jong*). Multaj ĉinoj estas sportemaj sur la placoj; ili dancas, gimnastikas, praktikas tajĝičuanon, ankaŭ ili muzikas per diversaj instrumentoj.

La lastan tagon kune kun ni vespermanĝis tri lernantoj, Trezoro kaj Ardo. Trezoro proponis regulon. Tiu kiu krokdilos, eĉ diros unu ĉinan vorton ĉirkaŭ la tablo, pagos la manĝon! Tio ne okazis! Ili sukcesis la finan ekzamenon! La tri spertuloj Ardo, Trezoro kaj mi miris, ke ili multe babilis en Esperanto. Ni gratulis ilin! Mi proponis, ke ili kontaktu min per skajpo aŭ "QQ" por praktiki Esperanton. Mi promesis sonregistri la dialogojn kaj rakontojn de la lernolibro "Moderna Esperanto (2)" ĉar tio mankas. Laŭ mi son-registraĵo de la lecionoj devas akompani la lernolibron, por ke la lernantoj bone prononcu la lingvon. Do, mi faris kiam mi revenis hejmen kaj sendis la son-registraĵojn al ili per interreto. Songbo de siaflanke legis kelkajn tekstojn kaj sendis al ni ĉiuj per "QQ".



Bona ideo, ĉar tio kuraĝigas ilin por progresi!
Mi esperas ke ni interrenkontiĝu tie en Jingchuan aŭ ie en Esperantujo! Mi imagas ke ili poste pli flue parolos Esperante!

Ankaŭ Trezoro tre ŝatus, ke aliaj eksterlandanoj praktiku aŭ instru Esperanton, tie por kuraĝigi la lernantojn kaj poste, ke ili iĝu instruistoj. Bedaŭrinde multaj ĉinoj ne havas okazon interparoli kun eksterlandanoj kaj ankaŭ oni bezonas en la lando spertajn instruistojn de Esperanto. Do, karaj legantoj vi ĝuos bonan sperton kaj tutcerte helpos ilin se vi venos en la "Esperanto Centro Ora Ponto", vi ne bedaŭros!

Changsha, 2017/07/03

HENRY Bruno

QQ: 2723929344

@: esperanto.bhenry@yahoo.fr

Klarigoj :

Moderna Esperanto (2) : Lernolibro por progresantoj ; LI Wei Lun ; eldonita de Ĉina Esperanto Ligo.

Juna Amiko : Estas internacia esperanta revuo por lernejoj kaj komencantoj, eldonata de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI).

ILEI : Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj.

PIV : Plena Ilustrita Vortaro eldonita de Sennacieca Asocio Tutmonda.

Monato : Internacia esperantlingva magazino sendependa kun artikoloj pri politiko, kulturo, scienco, moderna vivo kaj aliaj temoj eldonata de Flandra Esperanto Ligo.

Esperanto Vortaro por Lernantoj : Fremda Eldonejo Beijing Ĉinio.

QQ : Tujmesaĝila kliento ŝatata de la ĉinoj.

Skajo : Tujmesaĝilo kaj interreta telefono-reto.

Maĝango : *Mah-jong* estas ludo kiu devenas el Ĉinio.

Tajĝiĉuano : Estas ĉina interna batalarto.

Esperanto-Centro Ora Ponto estas Redaktejo de *Tra la mondo* <http://tra-la-mondo.esperanto-urbo.de>

Shijieyu Zhongxin, Jingchuan-Xian, 744300 Pingliang, Ĉinio

trezoro@qq.com, agrikulturo@126.com; Tel: +86+18893316800, Skype: huangyinbao, QQ552319856,

wechat: trezoro

Nilvange (Moselle)

Conférence sur une action d'aide à l'insertion professionnelle de réfugiés en Allemagne

Le 11 octobre les associations Forum des Citoyens de Nilvange et Espéranto Thionville ont organisé cette soirée au Café Culture Le Gueulard. Notre ami Thomas Cordonnier a assuré la traduction en Français. Une vingtaine de personnes espérantophones ou non ont participé à l'événement.

Rainer Kurz venant de Stuttgart nous a présenté son action pour insérer professionnellement des réfugiés hautement qualifiés très recherchés sur le marché du travail allemand.

Rainer a créé une entreprise et un site internet www.freelance-market.de avec l'aide de jeunes étudiants pour mettre en relation ces travailleurs avec des employeurs allemand en vue de les recruter.

A la fin de son exposé Rainer a répondu à de nombreuses questions du public sur les difficultés à faire connaître son initiative auprès des réfugiés. Son action est positive puisque un certain nombre d'entre eux sont embauchés.

Les jours suivants, Rainer, accompagnés des espérantistes locaux, a pu visiter la région Thionvilloise, la Vallée de la Fensch et le Luxembourg.

Bruno HENRY



Programo de kastelo Greziljono por la jaro 2018: gresillon.org/agendo

2018-apr-20/28: PRINTEMPaS, intensivaj kursoj kaj internaciaj KER-ekzamenoj: gresillon.org/p

2018-maj-09/13: Korusa renkonto de Interkant' kaj Vegana renkontiĝo: gresillon.org/koruso

2018-jul-09/27: Maratona Esperanto-kurso dum 18 tagoj

2018-jul-09/16: Interŝanĝoj de scioj kaj faroj kaj Esperanto-kurso: gresillon.org/s1

2018-jul-16/21: Turisma semajno kaj Esperanto-kurso: gresillon.org/s2

2018-jul-21/27: Internacia E-Konferenco de OSIEK "Esperanto en Artoj": gresillon.org/s3

2018-aŭg-11/19: Festa Semajno por infanoj kaj familioj, gresillon.org/s4

Programme du château de Grésillon : gresillon.org/agenda

20-28 avril 2018 : PRINTEMPaS, cours intensifs et examen international d'espéranto CECRL : gresillon.org/printemps

09-13 mai 2018 : Rencontre chorale d'Interkant et Rencontre Végane : gresillon.org/chorale


09-27 juillet 2018 : Cours d'espéranto marathon pendant 18 jours


09-16 juillet 2018 : Échanges de savoirs et de savoir-faire et cours d'espéranto : gresillon.org/s1fr

16-21 juillet 2018 : Semaine tourisme avec cours d'espéranto : gresillon.org/s2fr

21-27 juillet 2018 : Conférence Internationale d'Espéranto d'OSIEK "Espéranto dans les Arts" : gresillon.org/s3fr

11-19 août 2018 : Semaine festive pour enfants et familles : gresillon.org/s4fr

Organizita de MULHOUSE  ESPERANTO En amikaj rilatoj kun BAVELO	83a printempa staĝo de  <i>France-Est</i>
Okazos la 20 / 21 / 22-ajn de aprilo 2018 En la Feriejo RIMLISHOF 3, rue de Rimlishof 68530 BUHL apud Guebwiller	



Ĉi-tiu ferio-komplekso situas ĉe monto-flanko en Buhl apud Guebwiller en mirinda parko. Ĝi troviĝas survoje inter Guebwiller kaj Markstein.

Proksimaj stacidomoj:
 Colmar, Mulhouse,
 Bollwiller

ALIĜOJ kaj Restado-kostoj	
Ĉef-aliĝanto abonanta "La Informilo"n aŭ loĝanta ekster Francio	30 €
Ĉef-aliĝanto ne abonanta "La Informilo"n kaj loĝanta en Francio	47 €
Kun-aliĝanto (sama adreso kiel ĉef-aliĝanto)	18 €
Junulo inter 10 kaj 25 jaroj	12 €
Infanoj malpli ol 10 jaroj	3 €
Ĉambro kun 2 ĝis 5 litoj kun necesejo kaj duŝejo	
Kompleta pensio (1 tranokto + 1 matenmanĝo + 2 manĝoj)	61 €
Duon-pensio: (1 tranokto + 1 matenmanĝo + 1 manĝo)	53 €
Suplemento por individua ĉambro	12 €
Ĉambro kun 2 ĝis 8 litoj necesejo kaj duŝejo sur sama etaĝo	
Kompleta pensio (1 tranokto + 1 matenmanĝo + 2 manĝoj)	51 €
Duon-pensio: (1 tranokto + 1 matenmanĝo + 1 manĝo)	43 €
Suplemento por individua ĉambro	10 €
Pruntericevo de supra lito-tuko kaj tualetoj tukoj	7 €
Apartaj manĝoj	15,30 €

Bonvolu sendi la aliĝilon kaj vian antaŭpagon al :

André Grossmann
 5, rue des Pyrénées
 68390 BALDERSHEIM

Ĉekoj nome de: André Grossmann

CCP 819 34 U Strasbourg

Internaciaj ĝiroj al: IBAN:

André Grossmann
 FR6920041010150081934U036
 69

BIC: PSSTFRPPSTR

Pliaj informoj ĉe

André Grossmann:

andreo.ag16@free.fr

Tel. 03.69.54.46.93

poŝtel. 07.82.21.97.34

kaj Edmond Ludwig

esperanto.eludwig@orange.fr

Tel.: 03.89.77.52.56

En tiu ferio-centro troviĝas pluraj domoj, ni loĝos en du domoj.

En la domo: **Arche** troviĝas ĉambroj kun necesejo kaj duŝejo kaj la restoracio.

En la domo **Colombe** troviĝas ĉambroj kun necesejo kaj duŝejo sam-etaĝe kaj ankaŭ la salonoj por prelegoj kaj kursoj.



Provizora Programo:**Vendrede 20-an de aprilo**

- 17a Akcepto de la unuaj alvenantoj
- 17a30 eblas libere viziti
- 19a Vespermanĝo
- 20a30 Prezento de diapozitivoj
- 21a45 Malfermo de la knajpo.

Sabate 21-an de aprilo

- 8a30 ĝis 9a30 Matenmanĝo
- 9a30 Turismado vizito al Murbach
- 12a Reveno al la staĝejo
- 12a30 Tagmanĝo
- 13a30/14a30 Akcepto de alvenantoj
- 14a/14a30 Prezento de la novaj libroj de la libroservo
- 14a30/18a Kursoj C kaj D.
- 19a Vespermanĝo
- 20a30 Distra vespero
- Poste Knajpo malfermita

Dimanĉe 22-an de aprilo

- 8a30 ĝis 9a30 Matenmanĝo
- 9a30/12a Kursoj C kaj D
- 12a30 Tagmanĝo
- 13a30 Komitat-kunsideto
- 14a Turismado
- Poste: disiĝo

KURSOJ**C: Paroliga kurso:**

Tute en Esperanto.

Gvidas Edmond Ludwig

D: Seminario:

Prelegas Spomenka Ŝtimec

Aliĝilo por la 83a Regiona Staĝo de Esperanto en Rimlishof la 20/21/22ajn de aprilo 2018


S-ro S-ino	Familia nomo	Persona nomo	Aĝo, malpli ol 18 aŭ studento	Aliĝkotizo	Elektita kurso
1	ĉef-aliĝanto				
	kun-aliĝantoj				
2					
3					
Adreso					
Telefono:			Ret-adreso:		
Mi preferas manĝi vegetare <input type="checkbox"/>					
En la domo ne troviĝas pano sen gluteno, bonvolu mem zorgi.					
Mi pagas la tutan restadon aŭ minimume la aliĝkotizon:					
per ĉeko <input type="checkbox"/> per ĝiro <input type="checkbox"/> per internacia ĝiro <input type="checkbox"/> al André Grossmann					
Krom grava evento, la aliĝkotizo ne estas repagebla.					
Mi deziras ricevi mapeton por helpi la alvenon al la staĝo (signu) <input type="checkbox"/>					
<input type="checkbox"/> Mi elektas ĉambron kun necesejo kaj duŝejo <input type="checkbox"/> 1-litan ĉambron <input type="checkbox"/> 2-litan ĉambron <input type="checkbox"/> plurlitan ĉambron <input type="checkbox"/> Mi elektas ĉambron sen necesejo kaj duŝejo, ili estas sametaĝe <input type="checkbox"/> 1-litan ĉambron <input type="checkbox"/> 2-litan ĉambron <input type="checkbox"/> plurlitan ĉambron <input type="checkbox"/> Mi deziras prunte-ricevi lito-tukon kaj tualet-tukojn (7 eŭroj)					
Kiam kaj kiom de manĝoj kaj tranoktoj, bonvolu kompletigi		Vendrede	Sabate	Dimanĉe	
Tagmanĝo					
Vespermanĝo					
Tranoktado :					

Anjo AMIKA

Ne plu ofte eblas aŭdi en Esperantio profesiajn artistojn, kiajn ni ĝuis antaŭ la falo de la Fera Kurteno, kiam la okcidenteŭropaj ŝtatoj subvenciis Esperanton.

Escepto resta Anna Bartek – artista nomo Anjo AMIKA – profesia kantistino el Hungario. Ŝia repertuaro ampleksas modernajn, klasikajn kaj ekleziajn kantojn. Ŝiaj diskoj estas eldonitaj de Kooperativo de Literatura Foiro, en Svislando.

Ni scias, ke ŝi havas admirantojn en nia regiono, kie ŝi jam kantis (printempa staĝo en Landersen – Valo de Munster, en marto 2009). Cetere: ŝi bone memoras tiun ĉi kantvesperon! Ŝi ankaŭ promesis kantigi la staĝanojn jam vendrede vespere. Trejnu viajn voĉojn!

**Spomenka Ŝtimec**

Spomenka Ŝtimec, esperantlingva kroata verkistino, nun famas en la tutmonda Esperantio. Kiel juna aŭtorino ŝi prelegis en Mulhouse dum nia 31-a federacia staĝo en 1991. Nun, post 26 jaroj ŝi revenos kaj prezentos la kroatan movadon, nian samlandanon Roger Imbert, kiu estis eminenta aktivulo en la zagreba movado. Ŝi kompreneble ankaŭ parolos pri sia verkaro! Ne maltrafu tiun ĉi rendezuon kun eminenta esperantistino.



La programo de ĉi-tiu planita staĝo estas ankoraŭ tute provizora.

Ni klopodos ĝin aktualigi kaj disponigi al vi elŝuteblajn programon kaj aliĝilon, ĉe nia retejo:

<http://esperanto.france.est.free.fr>

Extrait du livre de Julia SIGMOND "Fronto aŭ dorso" (Pile ou face)
Traduko al la franca farita de Catherine ROUX-HARELLE, kun la helpo de Ginette MARTIN

Oui, je peux!

La mère a lavé, habillé, fait manger son fils, et l'a fait asseoir à sa place assise pour la journée. Il était déjà 9 heures, le programme pour les jeunes a commencé. Il l'appréciait beaucoup. Aujourd'hui, à la télévision, c'était sa jeune fille préférée qui était l'animatrice. Il s'était réjoui de la revoir. Mais c'était incroyable, pourquoi était-elle si sérieuse aujourd'hui? Ensuite, il a commencé à comprendre. Le contenu du programme d'aujourd'hui ne prêtait pas à sourire.

Entre-temps, la mère a préparé pour elle aussi le café du matin et elle est revenue vers son fils, car elle savait qu'il aimait beaucoup l'odeur de ce café. Terrifiée, elle a aperçu des larmes dans ses yeux.

- Mon chéri! Qu'est-ce qui s'est passé?
- Maman! Écoute la! La jeune femme lisait tristement une lettre. Un jeune garçon avait écrit une lettre d'adieu avant son suicide. Et la mère et son fils ont alors écouté les mots désespérés du malheureux garçon. Pour tous les deux, il était incroyable qu'un jeune garçon, beau et surtout en bonne santé, ne veuille plus vivre. La voix de la belle animatrice tremblait.

"Je ne trouve pas de but ni de sens à ma vie! En vain, mes parents achètent pour moi tout qu'ils peuvent imaginer, en pensant que je serai heureux d'avoir de nouveaux vêtements ou de nouvelles machines. Rien ne m'intéresse. Simplemment, je ne veux plus vivre!"

Pourquoi, dans quel but je dois vivre? J'ai décidé d'en finir avec la vie! Adieu!"

La belle jeune animatrice achevait la lecture et, visiblement, elle pouvait à peine retenir ses larmes.

Il y a eu une petite pause musicale. Pendant ce temps, la mère a essuyé les yeux pleins de larmes de son fils, mais aussi les siens.

La belle jeune fille est réapparue et, maintenant, elle lisait les statistiques sur le nombre croissant de jeunes qui se suicident.

A la fin, elle a posé la question aux auditeurs: Avez-vous une idée, comment nous pourrions aider ces jeunes désespérés? Si oui, écrivez-moi! Et l'adresse internet a suivi sur l'écran.

- *Maman! Note cette adresse! Je veux absolument écrire une lettre!*

La mère a rapidement noté l'adresse.

- Mon chéri! Je dois faire le repas de midi. Pendant ce temps, réfléchis. Je reviendrai vite, et tu pourras me dicter ta lettre.

Le jour suivant, la jeune animatrice, pleine de curiosité, consultait la boîte aux lettres de son ordinateur. Quelqu'un avait-il répondu à sa demande? Quelqu'un avait-il trouvé une idée pour aider? Seulement deux lettres étaient arrivées. La première était écrite par un homme âgé devenu amer. Il écrivait sans aucune empathie, avec de la haine contre la jeunesse actuelle: ils ont une vie trop facile et sans souci, pour eux rien n'est assez bon. Ensuite venait une longue plainte à propos de la vie des personnes âgées, qui étaient des enfants lors de la guerre mondiale. Ils avaient eu faim, s'habillaient de chiffons, n'avaient même pas de simples jouets, cependant tous voulaient vivre. A cette époque, le suicide n'était pas à la mode. Les jeunes d'aujourd'hui ne méritent pas de vivre! On ne doit pas les aider! On doit les laisser mourir!

Après cette lettre terriblement cruelle, elle a commencé à lire avec crainte la deuxième lettre.

Chère demoiselle animatrice, Comme toujours, aujourd'hui aussi, j'ai écouté et regardé votre programme pour les jeunes. Sincèrement, je vous avoue que j'ai commencé à pleurer. Je souhaiterais très fort aider ces jeunes qui ne sont pas capables de profiter des beautés de la vie.

Chère demoiselle! Je ne suis qu'un jeune homme de 18 ans. Je peux voir et entendre, mais je peux seulement remuer la tête. Je suis né avec une maladie inconnue, à cause de laquelle je suis absolument incapable de faire quoi que ce soit. Ma mère fait tout pour son fils sans défense. Elle me lave, elle m'habille, elle me fait manger et boire. Comprenez bien cela: je ne peux rien faire, absolument rien.

Cependant ma mère m'aimait si fort qu'elle m'a aidé, non seulement à vivre ma vie de handicapé, mais aussi à m'instruire! Car elle avait remarqué que j'étais infirme seulement au niveau du corps, mais que j'étais tout à fait normal au niveau du cerveau. Et j'ai étudié tout ce que peut apprendre un jeune homme de 18 ans. Et même beaucoup plus! Ma mère m'a appris à me réjouir et à profiter de tout ce qui est beau ou bon dans la vie! Ainsi, en regardant la télévision, je n'en sais pas moins qu'un jeune de 18 ans. Et même si je ne pourrai jamais nager ou skier, je regarde volontiers les jeunes qui nagent ou skient.

Ma plus grande joie est lorsque je peux regarder des programmes sur la très belle nature. Peu importe qu'il s'agisse d'animaux, ou de fleurs, ou de plantes. Grâce à la télévision, surtout votre programme de très grande valeur pour les jeunes, j'ai fait connaissance avec de nombreux philosophes et divers penseurs.

La littérature m'intéresse aussi, surtout lorsque j'écoute des œuvres en prose intéressantes. Par chance, ma mère a du temps, chaque jour, pour me faire la lecture à haute voix.

Chère demoiselle! est-ce que ce serait trop audacieux si je vous invitais, pour que vous voyiez de vos propres yeux que, même dans ma situation, il est possible de se réjouir de la vie?

Avec mon estime, Petro.

Des mois ont passé. Après l'interview de Petro à la télévision, des jeunes de plus en plus nombreux ont rendu visite à cet handicapé. On a décidé de faciliter le travail de la mère, et on a réussi à obtenir la permission à la télévision pour que, une fois par semaine, les jeunes rencontrent Petro dans le plus grand salon. Il y avait toujours un nouveau sujet à discuter.

De nouvelles amitiés sont nées. Grâce à Petro, tous ont commencé un petit peu à regarder différemment la vie et son sens. Sa force d'âme inhabituelle-triomphe de son corps impotent-a donné à tous un sentiment jusqu'alors inconnu! Tous ont appris la phrase miraculeuse qu'avait apprise Petro: "Oui, je peux!"

Traduit par Catherine ROUX-HARELLE, avec l'aide de
Ginette MARTIN

Fronto aŭ dorso estas kolekto de mallongaj rakontoj, kiuj portas la leganton en la realon kaj revojn de la premiita aŭtorino Julia Sigmond.



El nia libroservo

Informoj




--> la libroservo partoprenos la venontan komunan regionan staĝon en Rimlishof . Preskaŭ ĉiuj el niaj 700 libroj kaj kasedoj atendas vin! La listo de la libroj aĉeteblaj ĉe nia libroservo aperas en la retejo de Esperanto France Est : <http://esperanto.france.est.free.fr>. Se iu precipe allogas vin: avertu min per retmesaĝo, mi nepre kunportos ĝin (sed vi ne estos devigata ĝin aĉeti) !
Ĝis baldaŭ!

Jean-Luc Thibias

libroservo.efe@laposte.net



Novaj libroj



①



②

1. Kantu, Muziko, **Albrecht Kronenberger**, *Gmeiner*, 2017, 388 paĝoj. 12 € .

Pli ol 350 kristnaskaj kantoj, rondkantoj kaj antifonoj, kiun la aŭtoro, sola aŭ kun aliaj, verkis post la apero de ADORU, do ekde 2001. Aldone pli ol 40 nereligiaj kantoj faritaj inter 1989 kaj nun.

2. La sekreto de la strigo de Diĵono, infanlibro, **Magali Lautrou**, *Graine de moutard*, 2017, 10 €.


Bela fabelo pri la deveno de la strigo, verkita de Magali Lautrou kaj ilustrita de Jean-François Drouin. Dum la mezepoko, iun matenon, Agata, eta scivolema strigo decidas malkovri la belan urbon Diĵono. Sed konsiderata de la loĝantoj kiel simbolo de malfeliĉo, ĝi estas persekutita. Dank'al la amo de infano kaj al sia kuraĝo, ĝi fariĝos la feliĉo-donilo de la urbo.

Por mendi librojn:

- Vi sendas vian mendon
 - per poŝto al : Libroservo 37 RUE PIERRE ET MARIE CURIE 54500 VANDOEUVRE
 - per ret-poŝto al "libroservo.efe@laposte.net"
 - nur escepte per telefono: 03-83-53-57-54. Nur post la 20a horo.
- Vi baldaŭ ricevos viajn librojn kun fakturo (libroj + sendkostoj)
- Vi pagas vian fakturon per poŝta ĝiro al "libroservo 2800-76 H NANCY" (indikinte sur ĝin la numeron de la fakturo), aŭ per mandato aŭ ĉeko je la nomo "libroservo" sendita al la adreso de la libroservo.
Eksterlandanoj povas sendi internacian ĝiron al "LIBROSERVO"
IBAN : FR 98 20041 01010 0280076H031 97
BIC : PSSTFRPPNCY., indikante en la koresponda linio la numeron de la fakturo.

<i>Mendilo</i>		Bonvolu sendi tiujn librojn al apuda adreso:
S-ro / S-ino		
En		Subskribo:

Ni lernu per enigmoj kaj distraĵoj



SOLVO de la KVE de La Informilo 179 :

Horizontale:

1.ARKEOLOGI. 2.RUIN. ANAS. 3.KLASIKISM. 4. MALT. TA. 5.TT. LI. KRI. 6.EROT. VIOL. 7.KAPILAR. 8.TNEG. FLAN. 9.KRIOLIT. 10.EVA. LEĜ. 11.MICELI. LI. 12.ULIS. PUTR.

Vertkale:

1.ARKITEKT. EMU. 2.RUL. TRANKVIL. 3.KIAM. OPERACIO. 4.ENSALTIGI. ES. 5.ILI. ORL. 6.LAKT. VAFL. IP. 7.ONI. KIRLIL. 8.GASTRO. ATENT. 9. ISMAILAN. ĜIR.

HORIZONTALE

1. Kaleŝ'.
2. Daŭre. Antikva Tajlando.
3. Poezi', kiun oni kantis. Ag' por varmigi akvon.
4. INVERSE : metalfoli'. Ensekretige.
5. Duondetruiita. Esprim' de subita gajo.
6. Vorto esprimanta rifuzon. Demanda pronomo.
7. INV : prepozicio. Kalkeca teraĵ'.
8. Forigitoj.
9. Kalka ŝtono. Metal.

VERTIKALE

1. Granda boligil'.
2. Vorto uzata por saluti iun, kiam oni foriras. Vira nom'.
3. Eŭropa ĉefurb'. Papo sen vokaloj.
4. Helena diin' de la venĝo.
5. Rilata al ostoj de la pelvo. Padelo.
6. INV : nedifini pronomo. Forta voĉ'.
7. Implikita interplektaĵo de vojoj.
8. Kortuŝo. Metal'.
9. Hispana urb'. Loko.

La simbolo de Guglo sur ties franca retejo la 15-an de decembro 2009 (bildo prenita de Vikipedio)



En 2017 oni ankaŭ klopodis ĉe *Google*, por havi t.n. *Google-Emblemon* je la 14a de aprilo, la mortotago de Zamenhof. Bela ideo, sed ne eblis, ĉar *Google* ne festas morto-tagojn....

Google-Emblemo estas speciala provizora ŝanĝo de la mark-emblemo de *Google* ĉe ties serĉila hejmpaĝo en la komputilo; ĝi celas celebri/honori/memorigi pri festoj, eventoj, atingiĝoj, datrevenoj kaj la vivoj de famaj artistoj, pioniroj kaj sciencistoj k.s. Ofte ĝi estas amuza, mirinda kaj ili ĉiam altiras la atenton.

Tamen, je la 15a de decembro 2009 en multaj lingvaj versioj de *Google* aperis kiel *Google-emblemo* la vorto "*Google*" kun la Esperanta flago en la loko de la litero "l", por atentigi pri la 150-jara datreveno de la naskiĝo de d-ro Zamenhof.

Poemoj de Korine el Nederlando

1975 trioletto pri nomo

Korine skribiĝas per litero K
– ortografi' moderna, nova temp'
Nun ĉio koincidas en vivo mia
Korine skribiĝas per litero K
trovita en nia dua lingvo internacia
Cornelia, Corneel, Corine
KORINE skribiĝas per litero K
(ortografi' moderna) Nova Temp'!

LA 1-AN DE DECEMBRO (monda tago pri aidoso)

*ŝirmante teni kune
tra la jaroj*

*rigardadi kune
la multajn kandelojn
dum ĉi tiu memora tago
tutmonda*

*ankaŭ dum pluvo fluas larmoj
pro partneroj, filoj, filinoj ankaŭ
amikoj, konatoj
sed precipe multaj amikoj amataj*

*kiom mi mem ja konis?
(iuj ankoraŭ ĉiame en mia kor')*

*la 1-an de decembro
tra la jaroj
ekde neeviteble mortiga
al kronika laborinde akceptebla*

*almenaŭ ĉi tie
almenaŭ en nia okcidenta mondo*

*sed ankoraŭ ne ĉie
tutmonde*

ABONOJ KAJ KOTIZOJ POR 2018 ĝIS 2020

Nia asocio **Esperanto France-Est** havas la rajton atesti pri ricevataj donacoj aŭ kotizoj, dekalkuleblaj de la impostoj. La principo estas, ke eblas dekalkuli de la impostoj 66% de donaco aŭ kotizo al nia asocio. Tial ni povas proponi al vi kotizon je 20 eŭroj el kiuj 66% povas esti dekalkulitaj de viaj impostoj. Tiam entute vi estos paginta $20 - 66\% = 6,80$ eŭroj, sed nia asocio estos tamen ricevinta 20 eŭrojn. Se vi pagas tian kotizon aŭ pli, nia kasisto sendos al vi ateston, kiun vi povos aldoni al via imposto deklaro.

La atestoj rilatas al pagoj de kotizoj kaj donacoj ricevataj en 2017 (principe ĝis la 31a de decembro) por la imposto-deklaro de 2018.

Bonvolu trovi ĉi-poste la tarifojn por la venontaj 3 jaroj. Ni proponas al vi jam nun, antaŭ la fino de 2017, pagi vian abonon al **La Informilo** laŭ la ĉi-suba tarifo. Ni povas ankaŭ proponi al vi retan version en formato pdf favor-koste kompare kun la papera versio.

Krome vi povas elekti inter la 2 membro-kotizoj por nia asocio, laŭ via situacio rilate al impostoj.

		Jaroj:	2018	2019	2020	
		Abono por la papera versio:	17 eŭroj	17 eŭroj	17 eŭroj	
		Abono por reta versio en formato pdf:	7,5 eŭroj	7,5 eŭroj	7,5 eŭroj	
		Federacia kotizo:	7 eŭroj	7 eŭroj	7 eŭroj	
		Federacia kotizo kun atesto por viaj impostoj:	20 eŭroj	20 eŭroj	20 eŭroj	
UEA	MG	<ul style="list-style-type: none"> • Individua Membro kun Gvid-libro tra la Esperanto-movado. • Individua Membro kun Jarlibro (kaj ĝis inkluzive 34 jarojn, membro en TEJO kun la revuo Kontakto sen plia abonpago). • Individua Membro-abonanto: kiel MJ(-T) plus la revuo Esperanto 				
	MJ(-T)					11 eŭroj
	MA(-T)					26 eŭroj
			64 eŭroj			
Pag-manieroj	1. Per ĝiro al la poŝtĉekkonto de nia Asocio: <u>Esperanto France-Est CCP 1997 72W NANCY</u> Ne forgesu koncize mencii la celon de via pago sur la linio "mesaĝo" de via ĝirilo. La mencio de via adres-kodo faciligas la laboron de nia kasisto: ekzemple: abono Informilo + kotizo 2018 por 1208					
	2. Per bankĉeko aŭ poŝtbankĉeko je la nomo de: <u>Esperanto France-Est</u> sendita al jena adreso: S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM, Francio Klarigu la celon de via pago, abono al La Informilo, kotizo, donaco al ktp por 2018, 2019					
	3. Por Germanio al nia peranto: Poŝtĝirokonto: IBAN: DE13 5451 0067 0091 8566 76 - BIC: PBNKDEFFXXX Je la nomo de: Hans-Dieter Platz. (menciu la celon de via pago)					
	4. Per internacia ĝiro je la nomo de <u>Esperanto France-Est</u> kaj uzante la jenajn internaciajn kodojn: IBAN : FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC : PSSTFRPPNCY (Ne forgesu mencii la celon de via pago kaj vian adreskodon)					

Libroj eldonitaj de Esperanto France-Est aŭ akireblaj ĉe nia kasisto

"De Karlis al Carlo Rememoroj"

Kortuŝa rakonto pri la travivaĵoj de Carlo Nicolodi en malfacila periodo de la dua mondmilito, de Latvio al Italio, filo de Esperanto-paro, latva kaj itala. 12 + 2,90 = 14,90 eŭroj

Paul-Georges KOCH (1908 - 1982)

Eta selekto de poemoj tradukitaj el la germana fare de E.Ludwig 1,50 + 1,50 = 3 eŭroj

Knabaj petolaĵoj Poemoj de Gérard LESER en la alzaca,

tradukitaj al Esperanto de E. Ludwig 1,50 + 1,50 = 3 eŭroj

La harplektaĵo de Sylvie Reff Poemoj en alzaca

kun traduko al Esperanto de E. Ludwig 1,50 + 1,50 = 3 eŭroj

Etaj rakontoj pri al Katedralo de Strasburgo

Ĝin verkis kaj kompilis Sûzel PAILHES. Ĝi aperis en 12 lingvoj. En la Esperanto-versio ankaŭ aperas la hispana kaj la rusa lingvoj, 48-paĝa libro kun tre solida kovril-paĝo 12 + 6 = 18 eŭroj

Poŝamiko Jen agrabla libreto, kiu trafe prezentas sur 40 paĝoj, gramatikajn resumojn, tekstetojn, kelkajn

ekzercojn kaj laŭtemajn bild-vortarojn riĉe kolor-ilustritajn. 5,10 + 1,90 = 6,50 eŭroj

Nos cotisations 2018

Vous venez de recevoir le dernier numéro de notre bulletin trimestriel, **LA INFORMILO** pour la période 2017. Vous avez sans doute apprécié son contenu et vous désirez continuer à le recevoir régulièrement pour 2018 (4 numéros par an). A cet effet nous vous présentons ci-dessous les différentes cotisations 2018 et nous vous invitons à les payer dès maintenant. Nous espérons ainsi vous retrouver parmi nos abonnés et/ou nos membres.

COMMENT PAYER VOS COTISATIONS ET VOTRE ABONNEMENT ?

1. Association Régionale ESPÉRANTO FRANCE-EST :

La cotisation à notre Association Régionale ainsi que l'abonnement à **LA INFORMILO** sont à payer:

- de préférence par virement postal à **Espéranto France-Est CCP 1997 72 W NANCY** n'oubliez pas de mentionner sur la ligne de message le but de votre paiement et si possible votre code-adresse. *Ex. Abono Inf + kotizo 2018 por 756*
- par chèque bancaire à l'ordre de **Espéranto France-Est**, mais adressé à notre trésorier:
S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM.
- Profitez de votre paiement pour mentionner tout changement ou correction d'adresse. Une adresse différente sur un chèque n'est pas considérée comme nouvelle adresse. Indiquer votre adresse courriel pour l'abonnement version pdf.
- Une cotisation fédérale de 20 euros vous est proposée. Elle permet de déduire 66% des impôts. Ainsi vous n'aurez payé que $20 - 66\% = 6,80$ euros, mais notre association aura reçu 20 euros.

Abonnement et cotisation pour les années:	2018	2019	2020
Abonnement à La INFORMILO version papier	17 €	17 €	17 €
Abonnement à La INFORMILO version internet (format pdf)	7,5 €	7,5 €	7,5 €
Adhésion à l'Association Espéranto France-Est (à rajouter à l'abonnement)			
• <i>Cotisation fédérale</i>	7 €	7 €	7 €
• <i>Cotisation fédérale de soutien avec reçu fiscal pour bénéficier de 66% de réduction d'impôt</i>	20 €	20 €	20 €

2. Association Internationale UEA (cotisations 2018)

Les cotisations à l'UEA peuvent être payées directement à notre association Espéranto France-Est par l'intermédiaire de notre trésorier S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM qui transmettra dans les meilleurs délais.

Veuillez noter le code de la cotisation que vous payez. (cotisation UEA MA)

UEA	• Membre individuel reçoit le petit guide de l'UEA	MG	11 €
	• Membre individuel reçoit l'annuaire de l'UEA	MJ	26 €
	• (+KONTAKTO + TEJO-TUTMONDE, si moins de 30 ans)	MJ-T	26 €
	• Membre individuel reçoit l'annuaire de l'UEA + la revue mensuelle ESPERANTO	MA	64 €
	• (+KONTAKTO + TEJO-TUTMONDE, si moins de 30ans)	MA-T	64 €

3. Association Nationale Espéranto-France (UFE) (cotisations 2018)

Les cotisations à l'UFE sont à payer directement à UFE, 4bis, rue de la Cerisaie, 75004 PARIS - CCP: 855 35 D PARIS, en y joignant le bulletin d'adhésion, que vous avez reçu en tant que membre 2017 de l'UFE. **Votre adhésion à notre Association Régionale est comprise dans les cotisations de l'UFE si votre adresse se trouve dans les départements 54 55 57 67 68 88.**

Par contre l'abonnement à LA INFORMILO est à payer à notre Association Régionale, mais jamais à l'UFE.

UFE	• Membre actif d'Espéranto-France (avec reçu fiscal)	39 €
	• Membre actif d'Espéranto-France et d'Espéranto-Jeunes. (moins de 30 ans au 1.1.2018)	30 €
	• Tarif réduit pour étudiants, chômeurs	15 €
	• Première année	10 €
	• Cotisation pour un couple (avec reçu fiscal)	78 €
Le Monde de l'espéranto: Tous les numéros sont désormais librement accessibles en ligne dès leur publication sur le site: esperanto-france.org		


IMPORTANT

- 1) Les nouveaux adhérents à l'Association Régionale, recevront par courrier séparé leur carte de membre ainsi qu'un exemplaire des statuts de l'Association.
- 2) Les cartes de membre de l'année 2018 et éventuellement de l'année 2019 seront envoyés aux autres membres d'**ESPERANTO FRANCE-EST** par courrier séparé avec des informations spécifiques ou inclus dans l'envoi du bulletin La Informilo.
- 3) Les membres payant une cotisation fédérale de soutien ou un don en 2017 recevront un reçu fiscal pour bénéficier de 66% de réduction d'impôt pour la déclaration à faire en 2018.

Vizito al la Centra Oficejo de UEA en Rotterdam, Nederlando

Jen Korine invitas nin kune viziti la Centran Oficejon en Roterdamo. Por klare senti la etoson de tiu domo dum Malferma Tago, ŝi eĉ aldonis iom da fotoj. (de la 46a malferma tago de la 29a de aprilo 2017)


Ni kune ĝuu ŝiajn klarigojn.



Dum Malferma Tago ĉiam estas agrabla etoso. Ĝi okazas du fojojn jare, plej ofte en aprilo kaj novembro. Oni ŝanĝas, mirakle modifas oficejajn spacojn en salono por la prezentoj en tiu kvaretaĝa domo, kiu estas la Centra Oficejo (CO) de la Universala Esperanto Asocio (UEA). Kompreneble ne ĉiuj ĉambroj estas libere alireblaj por la publiko.

Kiam oni alvenas, tuj videblas la tipe 19a jarcenta ŝtuparo de domo en malnova kvartalo. Ne ĉiuj ŝatas tuj iri al la unua etaĝo, kie oni kunligas du oficejajn spacojn al unu granda salono por la prezentoj kaj prelegoj. Tie oni vidas ĉemure fotojn de la UEA-prezidantoj tra la jaroj, aŭ epokoj. Sur iama kamen-breto paradas busto de Zamenhof. Tamen ĉiam indas la peno grimpi la ŝtuparon ĉar interesaj temoj estas pritraktataj, ankaŭ ofte pri agado de junuloj aŭ TEJO.

Unue oni ofertas partopreni en la loterio. Kia agrabla akcepto, ĉar oni ĉiam gajnas ion! La zorgeme rulitaj paperbiletoj mencias la premiojn, kiuj varias inter ekz. glumarkoj de onta UK, bildkarto, libreto aŭ eĉ pli dika volumeno kiel iu Krestomatio.



Ĉiu Malferma Tago komenciĝas per sama programero. Oficisto Ionel de la Libroservo pritraktas kelkajn el la novaj libroj: kaj originale verkitaĵoj, tuj en Esperanto, kaj interesaj tradukoj. Poste ili akireblas en la Libroservo, kun sesona rabato por ĉiuj libroj (krom brokantaĵoj).

En la Centra Oficejo (CO) de UEA troviĝas la plej granda Esperanto-libroservo de la mondo. Ĝi ofertas nuntempe ĉirkaŭ 6000 titolojn de la libroj pri kaj precipe en la lingvo Esperanto.

La Libroservo vendas Esperanto-librojn, novajn librojn, brokantaĵojn, periodaĵojn, kompaktdiskojn kaj prizorgas abonojn. Ankaŭ estas ofertoj de multaj brokantaĵoj, bone listigitaj laŭ alfabeto ordo en la kela etaĝo de la domo. Cetere, ankaŭ en la reta katalogo de la Libroservo ili troviĝas.

En la kafejo oni vigle interbabilas. Daŭre haveblas teo, kafo kaj kuketoj, senpage. Multaj viglaj interparoloj kaj diskutoj aŭdeblas, ni ĝojas revidi






konatojn kaj konatiĝi kun novuloj. Tamen, krom la prelegojn, oni ne maltrafu la oferton kaj vendon de Esperantaĵoj en la sekretaria ĉambro.

La malformala etoso ĉiam denove frapas min. Dum la jaroj mi regule renkontis italojn, belgojn, nederlandanojn, germanojn, francojn kaj foje aliajn landanojn. Ĉiuj intence venis por la Malferma Tago. Mi konatiĝis kun Esperantistoj, kiuj ferietas, turismumas dum plilongigita semajnfino en grand-urbo Rotterdam, aŭ eĉ el pli malproksimaj regionoj Nederlandaj. Povas ankaŭ ke oni kaptas la okazon kombini viziton al geamikoj kaj renkonti konatojn en la ĉirkaŭaĵo. Ĉiuokaze indas la vojaĝo.

Eble vi nun tiom scivolemas pri la vivo kaj laboro en tiu domo en Nieuwe Binnenweg 176, aŭ vi deziras mem sperti la ĉirkaŭaĵon de la domo en malnova Rotterdam kvartalo, kvankam mankas al vi ebleco veni por vizito. Por ekkoni la oficejan etoson kaj havi impresojn, mi mencias kelkajn librojn kiuj temas pri la vivo, la laboro en kaj ĉirkaŭ la domo de la Centra Oficejo en Rotterdam. Ili ĉiuj estas verkitaj de iamaj oficistoj de la Centra Oficejo, kaj aĉetebraj ĉe la Libroservo de UEA.

István Ertl verkis la romanon “La Postdomo”, kiu aperis en 2003, kun ilustraĵoj de Francisco Veuthey. Ĝia priskribo en la libroserva katalogo estas jena: Humur-plena satira romaneto (kun movada fono), en kiu “fikcio kaj realo koincidas”. Jam la titolo ligas al la mondfam-konata libro de Anne Frank, kiu vivis en Nederlando kiam ŝi skribis tiun taglibron.




La 100^a mortodatreveno de Ludoviko Zamenhof
Solenata sub la aŭspicio de UNESKO

Organizaĵo de la Unuiĝintaj Nacioj por Edukado, Scienco kaj Kulturo



En 2008 aperis “Tuj apude. Gvidilo tra la kvartalo de la Centra Oficejo de UEA”. Ĝi estas ilustrita poŝformata gvidilo pri la ĉirkaŭaĵo de la CO, kompilita far Humphrey Tonkin.

Gbeglo Koffi verkis en 2002 maldikan sed ĉarman “La Centra Oficejo de UEA en vortoj”. Ĝi estas skribita kiel kvazaŭ-promeno tra la CO de UEA, kun priskribo de ties ĉambroj kaj ĉiutaga laboro. La persona stilo de la verkisto gvidas vin de ĉapitro al ĉapitro tra la etaĝoj kaj ties spacoj de la CO. Eĉ mencio de ĉiu neceso ne mankas! La libreto finiĝas per ĉapitro “Unu tago en la vivo de la Centra Oficejo” de Trevor Steele.



1. Biblioteko Hodler
2. Ĉambro Edwin Burg, kafejo
3. Libroservo
4. Konferencejo

Se vi interesiĝas pri la menciitaj libroj aŭ aliaj eldonaĵoj, vi povas mendi ĉe la Libroservo de UEA en la reta katalogo. Retadreso: <https://katalogo.uea.org/>

**Ĝis revido, en Rotterdam, aŭ aliloke en Esperantujo!
Korine Cheizoo, decembro 2017**

Granda Premio-dona Ceremonio TEO kaj AMO Dushan 2017 - Ĉinio



En Ĉinio en la Gubernio Dushan okazis granda ceremonio kun la nomo TEO ka AMO por disdoni premion pri mallongaj filmoj en Esperanto. La ceremonio okazis en la ĉina lingvo kaj en Esperanto. En lasta septembro vojaĝis al Pollando teamo de Pekina Esperanto-Asocio kaj fakuloj pri teo. Ĝuste okaze de tiu vojaĝo ili renkontis lokajn esperantistojn en diversaj polaj urboj kaj tiel sukcesis prezenti filmojn pri TEO kaj AMO. S-ino YU Jianchao raportas al ni pri tiu vojaĝo kaj restado en Pollando.

Septembre, mi vojaĝis en Pollando

De la 13-a ĝis la 28-a de septembro, ĉina teamo vojaĝis en Pollando por prezenti filmetojn. Temas pri "Teo kaj Amo". La vojaĝo estis zorgeme aranĝita. Laŭ la aranĝo, ni faru kvar filmprezentojn respektive en Bjalistoko, Varsovio, Bielsko-Biała (ĉe Krakovo) kaj Poznano. Konsistigis nian teamon kvaropulo el Pekina Esperanto-Asocio kaj kvinopulo el te-fako. Ili portas la taskon montri ceremonion de te-arto, interalie estis ĉina verkistino Wang Xufeng, fama pri verjoj de ĉina teo.



Atingo en Pollando la 13an de septembro 2017

La unua stacio: Bjalistoko

Bjalistoko estas loko revita de Esperantistoj. Ankaŭ mi, revis ĝin kvazaŭ sanktejon. Kiam ni atingis la varsoviaan flughavenon frumatene de la 13-a, renkontis nin juna ŝoforo, kiu ne parolis Esperante. Li estis dungita de sinjoro Georgo Handzlik jam antaŭ ol ni ekflugis el Pekino. Senhezite li veturigis nin rekte al Bjalistoko. Survoje ni pretere vizitis la Białowieża Nacian Parkon por vidi eŭropan bizonon, (sovaĝajn bovojn), pola ŝtata trezoro kiel heredaĵo difinita de UNESKO.

En vespera krepusko ni atingis la urbon Bjalistoko. Sinjorino Walentyna Fiszer-Dolińska jam preparis tablono da frandaĵoj hejme por bonvenigi amikojn el Ĉinio. Venis ankaŭ samideanoj de Bjalistoka Esperanto-Asocio kaj ĝia juna prezidanto Przemysław Wierzbowski dum vespermanĝo li konigis pri la itinero, laŭ kiu ni ekagados en postaj tagoj.

Sekvantan tagon, ni unue vizitis la ekspozicion pri Zamenhof. Nina, kapabla esperantistino, parolis kiel eksplikanto, detale klarigante la kopiitajn fotojn, la flaviĝintajn pape-rojn kaj eluzitajn objektojn faritajn dum la jaroj, kiam knaba Zamenhof vivis tie. La ekspozicio sidis en kultura domo de urba kvartalo kaj sur la unua etaĝo estas Esperanta libraro. Diligente laboras tie babilema Elżbieta Maria Karczewska. Ŝi entuziasme prezentis sian laboron kaj rakontis sian ĉirkaŭiron



Kun la vic-urbestro kaj prikultura oficistino de Bjalistoko

tra la mondo danke al Esperanto. Ŝi forte impresis min dum ŝi konigis unu post alia librojn eldonitajn sub ŝia zorgado. Ŝi donacis kelkajn inter la libroj al ni por ke ni forigu la enuigecon dum la vojaĝo. Mi dume vidis ŝin ridetanta kaj kontenteme feliĉa.

Tagmeze ni kunsidis kun la vic-urbestro kaj pri-kultura oficistino. Mi en la nomo de PEA donacis al la urbestro "Zamenhof-Teon" aparte fabrikitan por la Jaro de Zamenhof. Kaj sinjorino Wang Xufeng donacis al la urbestro sian verkaĵon kaj ankaŭ teon kun marko de Longjing. (fama marko de teo) dum la kuna tagmanĝo.



Transdono de teo al Pola Esperanto-Asocio



La pastro por Paca Preĝo en Aŭŝvico

Posttagmeze, Nina gvidis nin ĉirkaŭrigardi la urbon. En la urbo kun multaj historiaj monumentoj, kies ligiteco multe rilatas al Esperanto kaj Zamenhof, ni ekkonis ankaŭ la historion de judoj dum la Dua Mondmilito. Tuj mi komprenis la esprimon el la libro La Danĝera Lingvo, "..... al kies celado malfacile ne eblis ne montri la respekton".

Vespere ni faris la unuan film-prezenton en malgranda teatro. Bela te-artistino el Ĉinio prezentis la arton de te-ceremonio kaj gustumigis teon al spektantoj, kiu aparte venis por apreci la film-prezentadon. La etoso estis varma kaj vigla, ni faris ĝis tiam la plej sukcesan prezentadon.

La vespera manĝo estis tre aparta. Lokaj esperantistoj kunportis hejmfaritajn vinojn, kukojn kaj preparis la manĝaĵojn kun neeldireblaj nomoj por ĉinoj. Estis frandaĵa vespero!

Estis malvarme meze de septembro, sed Nina varme gvidis nin al Tykocin sekvant-tage. Tykocin estas urbeto nemalproksime de Bjalistoko, kie laŭdire post-restis plej bone konservita Sinagogo en Pollando. Ene la dekoracio estas impona. Nina konigis, ke vivis tie kvin jarojn la patro de Zamenhof en la domo fronte al la Sinagogo, tamen la nuna domo jam ne estas la origina spertinte la militon kaj rekonstruojn en pli ol cent jaroj. Post la vizito tie, ni havis interesan tagmanĝon, la polaj Pierogi, sed kun judeca stilo en judeca ornamita restoracio malantaŭ la sinagogo. Ni adiaŭis al Nina kaj Bjalistoko en Tykocin kaj sude direktiĝis al Varsovio.

La dua stacio: Varsovio



En Varsovio

En Varsovio, ni tranoktis en Mazurkas Konferenca Hotelo, malproksime de la urba centro.

Sed je la deka matene la 16-a, ni jam estis en la domo de Pola Esperanto-Asocio, kiu situas en la strato Andersa, korto 37. Estis sabate, jam atendis nin la samideanoj de la Asocio. Laŭplane estas programeroj posttagmeze. Ĉiuj organizoj kun oficejo en la strato eldomiĝis por montri sian karakteron al la publiko.



Lisa kun ĉapo alpinglita de esperantaj insignoj kolektitaj tra la mondo

La Esperanta Asocio havis sian butikon. Elstarigis sian aktivecon la ĉina teamo. Nia te-arto montriĝis paralele kun polaj artoj montrita de aliaj fakaj organizoj. Paralele montriĝis ankaŭ la filmprezentado en la halo de kultura domo. Lisa, la plej juna inter nia teamo ĉiam portis sian ĉapon kun variaj esperantaj signoj alpinglitaj, kiujn ŝi kolektis en diversaj aranĝoj tra la mondo.

Ŝi ir-reiris antaŭ la butikoj unu post alia, okulfrape allogis preter-pasantojn.

Vespere ni kvarope estis invititaj al apudurba ĝardeno domo. La posedanto famas pro muzaiko Varsovia Vento. Li kaj liaj amikoj gastigis nin per biero kaj rostitaj kolbasoj.



En juda tombejo; floroj kaj Zamenhof-Teo

Venis la tago, ke ni vizitu la tombon de Zamenhof en plej impona tombejo de judoj en Varsovio. Ni aĉetis bukcedon da freŝaj floroj por glorado al Zamenhof, kaj antaŭ la monumento mi faris paroladon en la nomo de Pekina Esperanto-Asocio. Ni metis sur la steleon la teon aparte faritan por la Jaro de Zamenhof. Post la ceremonieto, Roman Dobrzyński rakontis la konstruadon de la tombo kaj gvidis nin viziti la tutan tombejon. Ĉio iras en solena ordo kaj kiu scias, kia hazardo, ni renkontis junulon kun judeska ĉapo sur la kapo. Roman salutis lin kaj turnis sin al ni, dirante, “Mi konigu la junulon, li estas posteulo de Zamenhof-familio”.



Renkontiĝo kun pranepo de Zamenhof-familio

Roman diris, ke li konas la junulon kaj ofte vidis lin en la tombejo. Tiu-ĉi apartenas al la pranepa generacio de Zamenhofa familio, nun lernanta la hebrean lingvon sed bedaŭrinde ne Esperanton!

Forlasinte la Maŭzeleon de judoj ni promenis en la stratoj, babilante kaj rigardante la urbajn vidindaĵojn. Ni vidis la straton Zamenhof, aŭtobusan stacion Esperanto, kulturajn murojn, sur kiuj legeblas esperante saĝaj frazoj de famuloj kun ties portreto, inter ili estas nia majstro kaj teksto konigi lin kaj Esperanton! Ni tagmanĝis en la domo de PEA kaj ricevis la donacojn kiel memoraĵojn. Plej rara estas la broŝuro “La unua libro”, reeldonita de PEA por la Jaro de Zamenhof. Posttagmeze ni veturis al la tria celo: Krakovo.

La tria stacio: Krakovo

Kiam ni atingis Krakovon, jam vesperiĝis. Pluvegis. Ni loĝis en tre komforta familia hotelo. Ni ne imagis, ke jam serenis, kiam ni vekiĝis fru-matene. Sinjoro Georgo Handzlik kaj lia edzino Vinjo jam alvenis por renkonte bonveni ĉinajn amikojn. La tutan tagon ili akompanis nin ĉirkaŭrigardi la malnovan urbon de Krakovo. Georgo servis kiel ĉiĉerono, rakontis la historion de la iama ĉefurbo de Pollando, kaj la belajn legendojn pri la kastelo, la preĝejo, la unua universitato de Pollando.

Ĉe la krepusko, ni alvenis al Wieliczka salminejo ĉe Karpato. Ĝi estas la plej antikva salminejo de Eŭropo ekspluatata jam de la 13-a jarcento. En la jaro 1976, ĝi estis listigita en la ŝtatnivela antikvaĵo de Pollando, kaj en 1978 estis difinita de UNESKO kiel unu el la mondaj kulturaj heredaĵoj. Tie ni penetris je 130-metroj subtere sekvante la ĉiĉeroninon, kiu neimageble rakontis esperante la historion de la minejo! Ni admiris la homan miraklon kaj samtempe ege plezuris pro la rakontado en Esperanto rekte el la ĉiĉeronino!

Tranoktiĝis senvorte. Post unutaga sereno, venis ree la nubeca vetero. Tiutage ni vizitis Aŭŝvico-koncentrejon. Malhela estis la vetero kaj malhela estis la vizito.



en la Radio Bielsko



Georgo Handzlik rakontis la historion en Aŭŝvico-koncentrejoj. Ĝoja faris son-registraĵon.

Tie okazis la plej kruela krimaro dum la Dua Mond-milito. Georgo malsonore rakontis la malhelan historion. Ni enfalis en etoson funebran, por la judaj viktimoj, por la militaj suferantoj. Apud la koncentrejo, iu pastro aranĝis la Pacan Preĝ-Dialogon. Sinjorino Wang Xufeng eldiris la citaĵon de germana filozofo Theodor Wiesengrund Adorno,

“verki poemon estas kruda post Aŭŝvico”

Ŝi tamen konsideris la taskon, ke terenkontiĝo inter ĉinoj kaj poloj estas por la Paco. Vivu poezio kaj teo! Vivu la trinkaĵo por paco!

Tiuvespere, kontraŭ la pluvo ni estis en Bielsko-Biała. Ĉe la atingo, la geaktoroj de pupteatro de ties kultura domo jam viciĝis por la bonvenigo. Ili jam pretis por la ves-

pera prezentado. La Teatro famas tra Eŭropo pro sia prezentado de malluma teatraĵo. Fiere estas, ke la teatro gajnis la premion en la film-konkurso Teo kaj Amo!

La prezentado estis spektakle brila. Ni prezentis la premiitajn filmojn kaj la teatro prezentis la muzikon, dancadon, kantadon kaj mirinde belajn mallumajn teatraĵojn adaptitajn el la fabeloj de Andersen.

Post la sceneja prezentado, estis prezentado de te-arto inter amasoj. Spektantoj memvole viciĝis por gustumi la ĉinan teon kaj neforgesis oferti laŭdon al la trinkaĵo. La solena momento venis, ke Pekina Esperanto-Asocio kaj La pupteatro ĝemeliĝis! Ni interŝanĝis la liceon kaj amikiĝas en la aromo de teo. Estis la Pol-ĉina Nokto, tiam la arto orienta kaj okcidenta kunfandiĝas kiel perlo brilanta en pluva nokto.


La lastan tagon, kiam ni estis en Bielsko-Biała, ni vizitis la Radion entreprenatan de Georgo Handzlik. La private regata Radio, kiu ĉefe elsendis muzikajn programojn okupas la okan lokon inter la tutlandaj radioj divers-nivelaj, kaj Georgo postulas de siaj funkciuloj lerni Esperanton, kaj tiu, kiu pli bone parolas esperante povas ĝui la oficojoaĝon senpage al Ĉinio por la ĉijara film-festivalo! Certe li ne preterlasis la ŝancon fari intervjuon kun ĉinaj amikoj, kiuj parolis antaŭmikrofone pri Esperanto, pri teo, pri la filmoj kaj pri la spektakloj kreitaj pere de Esperanto.



Lisa, YU Jianchao kaj Nan Youli en kultura domo de Bielsko-Biała



Art-prezentado de junaj violinistoj de kultura domo en Bielsko-Biała



La kvara stacio: Poznano

Antaŭ muro kun frazoj de famuloj kaj ilia portreto en Varsovio

Ni adiaŭis la paron Georgo kaj Vinjo. Ni alkuris al lasta stacio Poznano. Tie Ĝoja devis anonci sian alvenon al la interlingvistika kurso estrita de Ilona Kounthy ĉe Universitato Adama Mickiewicza. Kvankam malfrua tamen ŝi estis bonvena pro la tre bona kunportita programo. Ŝi denove prezentu la filmojn en Arkones, la jare arta renkontiĝo de polaj esperantistoj. Post dutaga simpozio, ni aliĝis al la fama Arkones. Jam estis la 33-a Arkones, sed ni unuafoje spertis ĝin. Nia filmprezentado estis aranĝita en la spegula salono. Ni samtempe surtabligis ĉinaĵojn por vendi, ekzemple, teo, medikamento, herb-likvaĵo... La Zamenhof-teo estis rapide forvendita, sed aliaj objektoj restis senzorgoj. Ni do magie ŝanĝis la varetojn kiel donacojn. Neimageble la ruĝfruktoj, dolĉaĵoj faritaj el kratagaj fruktoj estis tiom ŝatataj. Mi kunportis ilin por apetitiveki dum nia vojaĝo. Tamen dum la tuta vojaĝo neniu el ni sentis sian stomakon malbona, ni ne havis la ideon manĝi ruĝfrukton. La teo kun la ruĝfrukto gustumebulis plej taŭge dum spektado de filmoj. Kiam finiĝis la prezentado, miaj dolĉaĵoj estis fordividitaj. Dank' al Zamenhof, nia prezentado finfine plenumiĝis, ni devis diri adiaŭon al Pollando.

Nelaste: Berlino



En Berlino renkontiĝo kun gepatroj Daniel Voss kaj Āsa Voss kaj iliaj du filinoj

Jam estis la 25-a, nia vojaĝo tra Pollando finiĝis. Ni flugis al Berlino, kie Ĝoja finis sian lastan taskon disdoni la premion al gepatroj Daniel Voss kaj Āsa Voss kun du filinoj, kies filmo gajnis la premion en la konkurso, sed ili ne povis vojaĝi al Ĉinio por la ceremonia premiado. Ilia premiita filmo titoliĝas: "Mi Soifas". Estas tre interesa animacia filmo, nepre prezentita en ĉiu prezento. Ili indas havigi al si la premion.

Berlinon mi unuafoje vizitis en la jaro 1999. Jam pasis 18 jaroj. La falinta muro restis, kiel ankoraŭ atesto de historio, kaj la Rejno fluanta tra Germanio je 865 kilometroj ankoraŭ "spegulas la historion de la tuta Eŭropo". (Hugo) Sed kiam forfluos kun la Rejno la nevidebla muro en la homa koro? Ĉu Esperanto finfine tra-rompos la baron de lingvoj aŭ vere funkcias kiel la ponto komunikiĝi la popoloj tra la mondoj?



"Teo kaj Amo" montras la eblecon.

Fotoj kaj raporto de s-ino YU Jianchao



BARATO 2015
stacio Gorakhpur,
kie troviĝas
la plej longa kajo
en la mondo - 1,35 km

